

SE LA ŜARKOJ ESTUS HOMOJ

Bertolt Brecht

—Se la ŝarkoj estus homoj —demandis al sinjoro Kojnero la plej juna filino de lia pensionmastrino—, ĉu ili kondukus pli bone kun la fiŝetoj?

—Jes, memkompreneble —respondis la sinjoro K. Se la ŝarkoj estus homoj, ili konstruus en la maro egajn kestojn por la fiŝetoj, kun ĉiaj nutraĵoj ene, tiel plantoj kiel bestaj materioj. Ili prizorgus, ke la kestoj havus ĉiam freŝan akvon kaj prenu ĉiajn sanfakulajn mezurojn. Se, ekzemple, fiŝeto vundiĝus naĝilon, ili tuj vindus ĝin al li, por ke la fiŝeto ne mortu antaŭtempe. Por ke la fiŝetoj ne morozigu, okazus, de tempo al tempo, grandaj akvaj festoj, ĉar gajaj fiŝetoj pli bongustas ol malgajaj. Ankaŭ ekzistus lernejoj ene de la kestoj. En tiuj ĉi lernejoj oni instruus al la fiŝetoj eniri en la ŝarkajn faŭkojn. Ili bezonus geografisciaĵojn por pli bone lokalizi la egajn ŝarkojn, kiuj vakvadis ĉie ajn. La ĉefa afero estus, nature, la morala formado de la fiŝetoj. Oni instruus ilin, ke nenio estas pli granda nek pli bela por fiŝeto ol gaje sinoferi; ankaŭ ili estus instruataj fidi je la ŝarkoj kaj kredi ilin, kiam tiuj ĉi dirus al ili, ke la ŝarkoj jam sin okupas forĝi por ili belan estonton. Oni farus kredi ilin, ke tiu estonto, kiun oni aŭguras al ili, nur estus sikura, se ili ellernos obei. La fiŝetoj devus bone singardi tiel antaŭ la fiaj pasioj, kiel antaŭ kiu ajn emo materiista, egoista aŭ marksista. Se iu ajn fiŝeto montrus tiajn emojn, liaj kunuloj devus sciigi tuj la ŝarkojn pri tio.

Se la ŝarkoj estus homoj, nature ili militis inter si, por konkeri malproprajn kestojn kaj fiŝetojn. Krome, ĉiu ŝarko devigus siajn proprajn fiŝetojn batali en tiu ĉi militoj. Ĉiu ŝarko instruus siajn fiŝetojn, ke inter ili kaj la fiŝetoj de aliaj ŝarkoj ekzistas ega malsameco. Kvankam ĉiuj fiŝetoj estas mutaj —la ŝarkoj proklamus—,

certe ili silentas en tre malegalaj lingvoj kaj tial neniam atingas interkompreni. Al ĉiu fiŝeto, kiu mortigus milite malamikan fiŝetparon, oni donacus ordenon el *varec* kaj krome la herotitolon.

Se la ŝarkoj estus homoj, ili havus ankaŭ sian arton. Ekzistus belaj bildoj, kie oni prezentus la ŝarkdentojn per mirindaj farboj kaj la ŝarkfaŭkon kiel veran amuzgardenon, kie oni ĝojas petolante. La teatroj de la marfundo montrus heroajn fiŝetojn, kiuj eniras entuziasmaj en la ŝarkfaŭkon, kaj la muziko estus tiel bela, ke, kun tiaj sonoj, la fiŝetoj, kolumbumataj de la plej plezuregaj pensaĵoj, kiel en revo, sinĵetus svarme, antaŭitaj de la blovorkestro, en tiun faŭkon. Ekzistus ankaŭ religio, se la ŝarkoj estus homoj. Tiu religio instruas, ke la vera vivo nur komencas por la fiŝetoj en la stomako de la ŝarkoj.

Krome, se la ŝarkoj estus homoj, la fiŝetoj ne estus plu ĉiuj egalaj, kiel ili estas nuntempe. Iuj okupus oficojn, kio superlokus ilin super la aliaj. Al tiuj fiŝetoj, kiuj estus iomete pli grandaj, estus permesata eĉ engluti la pli malgrandajn. La ŝarkoj rigardus plaĉe tiun ĉi praktikon, ĉar ĝi liverus al ili pli grandajn mordpecojn. La fiŝetoj pli grasaj, kiuj estus okupantaj certajn postenojn, transprenis subteni la ordonon inter la aliaj fiŝetoj, kaj ili devenus majstroj aŭ oficiroj, inĝenieroj specialistaj en la kestkonstruado ktp.

Per unu vorto: ekzistus finfine klereco en la maro, se la ŝarkoj estus homoj.